# INFORMILO

**Numero 2/eo**
**Decembro 2003**

## Plifirmiĝas SAT-en-Hispanio.

Ni plu informas vin pri la agadoj de la Asocio *SAT-en-Hispanio*, grupo kiu celas agadi per kaj por Esperanto en la laboristaj kaj progresemaj medioj en Hispanio, en konekso kun SAT, la *Sennacieca Asocio Tutmonda*. Ni celas informi vin ankaŭ pri la agadoj de SAT, kaj de la cetera laborista Esperanto-movado.

En tiu ĉi dua *Informilo*, ni prezentas al vi nian aktivadon dum la lastaj monatoj. Vi jam scias ke vi povas informiĝi pri niaj celo kaj ekzistokialo en nia retpaĝaro http://satenhispanio.eresmas.com, kaj ke vi povas peti de ni ĉian ajn informon pri la proponoj kiujn ni kaj ĝenerale la laborista Esperanto-movado povas prezenti por la problemoj de la nuntempa socio.

## SAT en Eŭropa Socia Forumo

Kiel decidite en sia lasta kongreso, SAT partoprenis en novembro 2003 la **Eŭropan Socian Forumon**, en Parizo kaj ĉirkaŭaĵoj. En kunlaboro kun la franca laborista Esperanto-asocio SAT-Amikaro, SAT disponis budon, en kiu oni informis ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri la laborista E-movado, kaj pri la solvoj proponataj de SAT al la problemoj okazigitaj de la nuntempa etapo de kapitalisma tutmondigo kaj novimperiismo.

Detala raporto pri la rezulto de la agado, en Esperanto, kaj en la franca lingvo, estas legebla en la paĝaro de SAT-Amikaro. Resume: "certe tre malmultaj estis la partoprenantoj de la Forumo, kiuj ne aŭdis aŭ ne vidis la vorton *esperanto*, kiuj ne eksciis ke grandaj eblecoj kuŝas en tiu lingvo por krei la bazojn de alia mondo. La rilato al la ideo de Esperanto estis preskaŭ ĉiam simpatia, foje eĉ entuziasma, malofte moka, malagrabla aŭ malamika".

Okazis samtempe serio da prelegoj, interalie de Jakvo Schram, prezidanto de la Plenumkomitato de SAT. En la lasta tago, la 15an de novembro, okazis multenombra manifestacio, dum kiu tre klare vidiĝis nia lingvo kaj nia movado.

Ke la ĉeesto de esperantistoj en la Forumo estis perceptebla, pruviĝas per la raportoj en la amaskomunikiloj. Konkrete, en Hispanio troviĝis mencioj al tio en almenaŭ du ĵurnaloj, la katalunlingva *Avui* kaj la tuthispana *El Mundo*. Ambaŭ uzis nian partoprenon por reliefigi la notindan diversecon de la ĉeestantoj de la Forumo.

*Avui* diras titole: “La Socia Forumo evidentigas la ekstreman diversecon de la alimondistoj. La kunveno kunigas ekde esperantistoj ĝis rompantoj de montrofenestroj.”

Kaj jen la teksto de *El Mundo*: “La diverseco de la kontraŭtutmondiga movado montriĝis evidenta dum la manifestacio, kun movadoj de solidareco kun Palestinio, apud agrikulturaj sindikatoj, kontraŭkapitalismaj grupoj, politikaj partioj kaj 'aktivuloj' favoraj al la altrudo de Esperanto kiel "demokrata lingvo" en tuta Eŭropo”. Pri tio ke certe nia movado ne celas tian *altrudon* necesas certe nenia komento.

## SATeH en la datreveno de la ĉilia puĉo

Dum la monato septembro, SATeH kunmemoris la 30an datrevenon de la ĉilia puĉo kaj de la murdo de Salvador Allende. Vi povas trovi la tekstojn en nia retpaĝo de la lastaj alvokoj per la radio, en la hispana kaj la tradukon al esperanto (speciale por nia asocio).

LA LASTAJ VORTOJ DE SALVADOR ALLENDE:

**Laboristoj de mia Patrujo, mi havas fidon pri Ĉilio kaj ĝia destino. Superpasos aliaj homoj ĉi tiun grizan kaj amaran momenton kiam la perfido celas sin trudi. Vi pluiru, sciante ke multe pli frue ol malfrue, ree malfermiĝos la grandaj aleoj kie pasos la libera homo por konstrui pli bonan socion.**

**Vivu Ĉilio!. Vivu la popolo!. Vivu la laboristoj!.**

**Ĉi tiuj estis miaj lastaj vortoj, kaj mi certas pri tio ke mia sinofero ne estos senutila, mi certas pri tio ke ĝi almenaŭ estos morala leciono kiu punos la mallojalecon, la malkuraĝon kaj la perfidon.**

Vi povas trovi ankaŭ la tradukon de la himno de la Popola Unuiĝo de Ĉilio, "¡Venceremos!" (*Ja ni venkos*).

Aldonajn tekstojn, kun analizo de la sekvoj de tiuj okazaĵoj, oni povas trovi en la esperanta eldono de la revuo *Le Monde Diplomatique:* **http://eo.mondediplo.com**

---

## Aliĝu vin al SAT kaj SATeH!

Fariĝu membro de SAT. La kotizo por la jaro 2004 estas 32 €.

Kontaktu la SAT-peranton en Hispanio, k-don Pedro Hernández Úbeda, strato Candilejas, 26, 1º izda, 28018 Madrid, esperanto@mi.madritel.es

Helpu nin disvastigi kaj plifirmigi la laboristan E-movadon en Hispanio. La kotizo de SATeH estas nur 5 € por la jaro 2004 (subtenaj kotizoj ankaŭ ekzistas).

# SATeH en la Festo de la PCE-Partio

Unuafoje, nia asocio disponis je propra budo en la tradicia Festo de la Hispana Komunista Partio, okazinta en la monato de septembro.




Ni pensas, sen duboj, ke la akceptado de niaj vizitintoj estis tute pozitiva. Centoj da personoj alvenadis, demandadis, ĵetis rigardon al niaj afiŝoj, aĉetis niajn librojn (ili elĉerpis la *Komunistan manifeston* en esperanto!). Ni konvinkuĝis ke ni devas obligi nian informan aktivadon: la plejmulto de niaj vizitantoj rigardis kun simpatio nian agadon, sed tute nesciis ke nia lingvo havas rolon en la lukto por pli justa kaj solidara mondo.

# Eŭropa Konstitucio

Ni malfermis en niaj vicoj debaton pri la projekto de eŭropa Konstitucio. Ĉu ĝi signifas progreson? Ĉu ĝi estas nana antaŭeniro? Ĉu ĝi firmigas la hegemonion de la ŝtatoj? Kiel ĝi funkcios kun dudeko da lingvoj, aŭ ĉu ĝi solidigos la dominadon de unu sola?

**Skribu al ni kaj sendu vian opinion**. Eble ni ankoraŭ havas tempon influi, por ke aŭskultiĝu la voĉoj de la civitanoj.

**Tre grave:**

Pro eraro de presado, en kelkaj ekzempleroj de nia lasta *Informilo*, la numero de nia poŝtokesto aperis malĝuste. La vera estas:

**Apartado nº 8537**
**(ES-)28080 Madrid**

# SAT-Kulturo

La kultura laboro estis ĉiam baza aspekto en la profilo de SAT, kaj ĝia eldona kaj kleriga klopodo estis ĉiam agnoskata en la Esperanta komunumo, ĉefe pro la eldono de la tiom grava *Plena Ilustrita Vortaro*.

Nun tiu aktivado translokiĝis al Internet, per la kreado de specifaj kulturigaj paĝoj, kun speciala atento al tiu specife laborista aŭ progresema. Tradukojn de beletraj tekstoj, kia *Mortula ŝipo*, de B. Traven, de kuba infana literaturo, sociajn tekstojn, muzikon, afiŝojn de hispana intercivitana milito..., ĉion ĉi vi povas trovi en **www.satkulturo.de**.

Aldonan kulturan materialon, al kiu ankaŭ vi povas kontribui, vi trovos en la paĝaro de SATeH (http://satenhispanio.eresmas.com/kulturo.htm), kun, interalie, specimenoj de popola muziko.

# Libro-Servo

SATeH peras librojn eldonitajn de SAT. Jen listo de libroj haveblaj:

| TITOLO | PREZO (€) |
|---|---|
| Nova Plena Ilustrita Vortaro | 70,00 |
| Historio de SAT | 4,60 |
| Manifesto de sennaciistoj | 1,25 |
| Vivo de Lanti | 11,50 |
| Petro (facila legolibro) | 1,50 |
| Sepmil tagoj en Siberio | 22,00 |
| La fremdulo | 9,15 |
| Universalismo | 12,00 |
| Vualo de l' silento | 10,70 |

(TRE GRAVE: Al la indikitaj prezoj oni aldonu la sendokostojn se poŝto necesas.)

Krome, ni ankaŭ peras kelkajn hispanlingvajn librojn por lerni Esperanton. Kaj, se necese, ni povas havigi al vi librojn en Esperanto, kun socia enhavo, verkitajn de aŭtoroj hispanaj (Cervantes, Lorca, Valle Inclán).

Por pliaj informoj aŭ mendoj, skribu al nia asocio.

---

**Por kontakti kun ni:**

**Asociación Izquierda y Esperanto SATeH (SAT-en-Hispanio)**

Poŝtokesto (Apartado de Correos) 8537, (ES-)28080-Madrid
satenhispanio@eresmas.com

**http://satenhispanio.eresmas.com**